

HEROLD



de esperanto



MONATA INFORMILO DE KULTURA CENTRO ESPERANTISTA

Numero 4 (2295), 95^o jarkolekto

Esperanto-Domo, Postiers 27, CP 311, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando) - telefono (41)32 9267407 - kce@esperantio.net - pēk 23-2921-8

aprilo 2019

Internet is broken: interreto kaputis

Internet is broken: interreto kaputis, deklaris antaŭ du jaroj Evan Williams en intervjuo ĉe *New York Times*. La fondinto de Blogger, Twitter, Medium jam de longe dubas pri la intuicio kiu situas fone de la sociaj retoj, ekde Facebook: la homoj dezirus komunikii, montri sin, kaj per tio ĉio pliboniĝus.

Bedaŭinde interreto premias la ekstremajn. Se vi vidas akidenton dum vi ŝoforas, kompreneble vi observas ĝin; kaj ĉiuj, ĉirkau vi, observas. Interreto interpretas similan konduton tiel, ke ŝajnas ke ĉiuj volas vidi akidentojn; kaj efikas tiel ke ilin ĝi ricevu. La problemo estas ke ne ĉiuj homoj estas bonkondutaj. La homoj estuloj estas homoj. Ne hazarde ĉe niaj domoj la pordo havas serurojn. Kontraŭe, interreto komencigis sen la penso ke ni devus apliki tiun skemon linee.

Iam Evan Williams opiniis ke se ni ĉiuj povus nin esprimi libere kaj interŝanĝi opiniojn kaj informojn, la mondo fariĝus aŭtome pli bona. Nun li konfesas: *mi eraris*.

Efektive Donald Trump asertas, ke li fariĝis prezidento de Usono danke al Twitter. *Se estas tiel, mi vere bedaŭras*, komentarias Williams. Ĉu li bedaŭras pri kiom utilis Twitter, aŭ por kiu? Verŝajne pri ili ambaŭ.

En la universitato de Nebraska, kelkajn tagojn pli frue, Williams diris: *Silicon Valley perceptas sin kiel Prometeon, kiu ŝtelis la fajron de la dioj kaj donacis ĝin al la mortemuloj. Ni tamen emas forgesi ke Zeŭs tiom koleris kontraŭ Prometeo, ke li alĉenigis lin al roko, por ke la birdoj povu beki al liaj visceroj poreterne. Nun iu povus diri kion ni meritus, se ni liveris al Trump la povon per tvitoj.*



Prezidento Trump estas konsiderata unu el la plej danĝeraj retkomunikantoj.

En Esperantio oni spertas la samon: ju pli vi insultas en sociaj retoj (ofte uzante vortojn kiuji indikas kemie respektindajn substancojn, kiel faras Jorge Camacho per *merdo*, aŭ la pli fajna Lee Miller per *sterko*) des pli vi trafas aplaŭdon. Almenaŭ ĉe certa parto de la esperanta popolo, ĝuste tiu kiu ne kredas ke ni povas esti popolo, kaj interalie ĵus elektis s-ron Miller al la Akademio de Esperanto.

La sociaj retoj iel ŝirmas kontraŭ punbleco, kio ne okazas kun la preso. En la kazo Camacho, post amaso da insultoj kontraŭ itala profesoro en la reto, finfine nur la unua intervjuo en gazeto kaŭzis la distanciĝon de la estraro de Universala E-Asocio. Tamen ne ĉiam la reto savas: minaco de proceso pro kalumnio kaŭzis rapidan retroton de Kalle Knivilä en *Libera Folio* (tiam ĝia redaktoro, poste sveda spiona forpelita de Rusio). Jes ja, sed temas pri (skandal)gazeto, ne pri socia reto.

Revene al la makrosocio: Williams klopodas rompi la saman malvirtan cirkviton. Post Twitter la manaĝero revenis al ĵurnalismo. Lia ambicio estas difini novan skemon por la komunikiloj, en mondo batalanta sub la pezo de enhavoj falsaj aŭ superfluaj. Lia lasta aventuro, Medium, celas (mal)longajn kontribuojn de verkemuloj, amatoroj kaj profesiaj; ĝi baziĝas sur reto de verkantoj kaj legantoj, por modifi kaj malkovri novajn afiŝojn. Rapide ĝi arigis dek tri milionojn da vizitantoj monate, sed la blogoj laŭ Williams ne filtras ankoraŭ adekvate la novajojn.

La ideo ne estus la kreto de ia likva cenzuro (analogie al likva demokratio) sed novtipa ekvilibro inter la antikva sistemo de la ĵurnaloj, kie nur la profesiaj redaktoroj kontribuis al la enhavo, kaj la nova bloga metodo, kie ĉiu povas publikigi ion linee.

Revene al la mikrosocio: se ni aplikus al HdE la ideojn de Medium, en la retejo de HdE mi publikigus ĉi tiun artikolon kaj poste iu komisiito administrus la komentariojn, surbaze de interaga sistemo por pli konstrua konversacio pri la ideoj. Domage tamen, ke verŝajne granda konversacio inter esperantistoj ekestas nur se temas pri la lingvo mem...

Giorgio Silfer

Lingva kolokvo krone al la ora jubileo



La 5^a Lingva Kolokvo de KCE kiel kutime arigis Lingvajn Komitatojn de Esperantio (Conde Rey, Martinelli, Minnaja, Silfer) kaj (eks)akademianojn (Alcalde, Martinelli, Minnaja). Pro malsano bedaŭrinde ne povis partopreni LKD-anoj Chmielik kaj Nilsson.

Diversaj diskutoj estis altnivelaj kaj stimulaj, kadre de prelegoj, sed ne nur. Krome la programo inkludis unikajon, kiel la filmon *Antaŭen* (1937) aŭ la viziton al "modernismo" [laŭ secesia stilo] kremaciejo. Verŝajne se mi ne estus abstemiulo, mi ĝuus la restadon eĉ pli, ĉar ankaŭ gastronomie la evento estis mirinda.

Javier Alcalde

Kiel konate, LKD estas specifa komisiono konsilanta pri lingvaj demandoj el la rāumisma vidpunkto (vivanta ĉeflingvo de vivanta diajorbo), dum AdE havas multe pli heterogenan konsiston, kaj estas regata precipe de "bonlingvanoj", post jardekoj de itisma gvido. La unuan prezidas la Konsulo

Kiel regio Pro Esperanto intervenis ĉi-monate por flegi la E-Domon, laŭ peto de la proprietulo (KCE). Estis referita la balustrado sur la interdoma teraseto, repargetumita la planko de la vivoĉambro en la Privata, anstataŭigita la lavabo en la Privata, remebilita la Civita ĉambro, kaj prizorgitaj ankaŭ multaj minoraj sed gravaj detaloj. Helpis la Civila Esperanta Servo, al kiu KCE tre dankas pro la valoro kontribuo.

La 2^{an} de aprilo d-ro Mark Fettes, prezidanto de Universala E-Asocio, konfirmis per cirkulero al la Komitato ke la jara deficiteto de la asocio en 2019 tanĝos cent kvardek mil eurojn, do iom malpli ol kvaronon de la deklarita financa kapitalo. Laŭ tiu tendenco, en 2022 UEA ne plu havos kapitalon en moveblajoj, kaj devos ekvendi la domon aŭ la apartementon en Roterdamo.

Por preventi tiun katastrofon, soje de sia mandatfino (kun statuta nereelekteblo) la sama prezidento jus anoncis la baldaŭan maldungon de almenaŭ kvinono de la personaro en Nieuwe Binnenweg 176, apogante sin al la decido de la Komitato en Lisbono (laŭ propono de Dietrich Weidmann, sviso), pro kiu la deficiteto nun buĝet-ebla por 2020 ne devos superi sepdek mil eurojn.

En 2019 UEA elspezas pro salajroj 278.000 eurojn, kio egalas al du trionoj de la asociaj kostoj. La pezo de la burokrata aparato

Verkistoj al Eŭropo

La Pac-Komitato de PEN Internacia aprobis 5 apr 19 en Bledo la tekston de nefermita letero al la EU-civitanoj, kiu invitas ilin al la partopreno en la baloto la 26^{an} de majo. Al la invito aldoniĝas la sekvas frazoj:

Dum Eŭropa Unio, nature, ne estas Eŭropo mem kaj, kiel ĉiuj homoj institucioj, ĝi ne perfektas sed bezonas reformadon, la neceso ĝi estas realigeblaj nur de tiuj politikistoj kiuj respektas niajn humanismajn valorojn kaj kredas en la vizio de komuna Eŭropo. La hodiaŭaj defioj, kiel ekonomiaj maljustaĵoj, klimata ŝango kaj militoj, ĉiuj kondukantaj al amasa migrado, ne estas solveblaj fare de populismaj, simplecaj aliroj laŭ kredigo fare de hipernaciistoj.

Ni vokas al la formado de komuna eŭropa eduka programo kiu inkluzivas la instruadon pri la historio de ĉiuj landoj en Eŭropo. Per tiu vojo ni povus atingi Renesancon el kunvivado, la finon de aŭtokratio kaj novan ondon de solidareco inter ni ĉiuj.

La delegito de la Esperanta PEN, c-ano Giorgio Silfer, sukcesis aprobi tri amendojn, kiuj igis la leteron pli oportuna en la konteksto de la brita secesio, de la situacio en orienta Eŭropo kaj de la rajtoj de minoritataj popoloj.

Intertempe, la indiko pri Eŭropa Unio malaperis el la kovrilo de la britaj pasportoj eldonataj ekde la 30th de marto, la tago post la planita eliro el EU. La koloro ja restis la bordoza, sed estas planata la reveno al la mara bluo de la antaŭa jarcento...

Maldungoj en Roterdamo pro ŝvebanta bankroto de UEA



estas administre tro granda, des pli ke (teorie) UEA ne havas kostojn pro interpretado kaj tradukado, kiu egalas al la duono de la salajroj en ordinara INRO, laŭ kalkulo de eksestrarano Gian Carlo Fighiera (pri kiu tamen la tiama direktoro Osmo Buller publike deklaris, ke ne eblas rezonadi kun li).

La du agnoskitaj (post)komunitoj, membroj de la triopa financa komisiono, dividigis: d-ro Corsetti aplaŭdas la decidon maldungi, s-ro Buller instigas al sindi-

bankroto de UEA

kata mobilizo kontraŭ la eliranta estraro. Corsetti eĉ proponas *liberigi de la libroservo favore al funkcianta libroservo aŭ organizi re-tan libroservon*, kio oblikve signifas skribi la nomon de Ionel Onet kiel unuan en la listo de la maldungendaj. Siavice, Buller kontraŭproponas draste redukti la aperoftecon de la revuo *Esperanto* kaj *Kontakto*, eĉ pagigi al TEJO la deficiton de ĉi-lasta (kvankam *Kontakto* jure apartenas al UEA).

La maldungo de duono de la oficistaro estis jam proponita en 1995 fare de estrarano Hans Bakker, kun la plena subteno de la gvida instanco. Tiam la tutaj burokratoj reagis minacante generalan eksigion. Tian ŝancon la tiama estraro ne kuraĝis trafi, kaj preferis mem retiriĝi... Kio okazos nun?

HeKo

Ci tiu informilo estas senpaga. Libervola subtena donaco por KCE estas bonvena al unu el la kontoj en Svislando, Francio, Italo, Belgio, Hispanio, Svedio...

Tago de ĉiu pioniroj

La Esperanta Civito honoris 14 apr 19 la homon kaj la poeton Jarl Hammarberg, dum sobra ceremonio prezidata de la Konsulo en la Panteono de Esperantio. La fokusado de la oracio estis pli politika ol beletra, ĉar ne multaj scias ke la svedo havis en sia lando rimarkindan rolon kiel pacifisto.

En 1965 lia arta ekspozicio estis fermita de stokholmaj aŭtoritatoj, pro militriuza afišo kiun li mem skribis kaj pendigis. Pluraj gravaj intelektuloj protestis kaj alvokis favore al li, kiu estis eĉ enprizonigita. Tio donis al li renomon, kaj parto de la ĝeneralaj opinioj deziris koni lin kaj lian konkretisman arton.

Hammarberg, aŭ Martelmonto por la niaj, havis problemon kun la prononcado. Tio kombiniĝis al lia ekstremaj sentemoj kaj kondukis lin serĉi la sonojn kaj la sonorecon en vortoj kaj vorteroj. Li ne hezitis alternigi silabojn kaj stampajn vortojn al la "natura" bruo de ĉiutagaj iloj, ekzemple elektraj kuiriloj. Li serĉis eŭfonion en la homa voĉo kaj ian harmonion en la kakovonio de enhejma universo.

Raumistoj tre aprezis lin, arte kaj politike: dum du mandatoj li sidis en la Senato de la Esperanta Civito. Sen lia voĉo mankus la necesa kvorumo por aprobi ĝuste la legon kiu kreis la Panteonon. Li hezitis ĉar, kiel mistikema Martinus-an, li kontraŭis kremacion. *Lex Bertilia* trovis lian aprobon (en Bruselo, julie 2008) nur kiam li komprendis ke la Panteono akceptos ne nur cindrojn, sed ankaŭ cenotafojn, honore al la forpasintoj. Tia estas nun lia sorto.

HeKo

La Komitato de KCE plifortigis per la unuanima alekto de dino Lorena Bellotti, okaze de la jusa Asembleo.

C-ini Bellotti gvidas la delegacion kiu reprezentas EoN ĉe ALTE. Pro tiu ĉi kooptado ŝi estos rekte kulpita al la plenuma instanco de la kulturocentro kaj povos sekvi de proksime, do pli akurate, la evoluon de la tuta societo.

Kiu prezidos UEA?

La du diverĝaj aloj de UEA konfrontiĝas en la konkuro inter Duncan Charters kaj Fernando Maia jr, ambaŭ kandidatoj al la posteno de prezidento.

La 80-jara Charters apartenas al la sama generacio, eĉ devenas el la sama medio (Brita E-Junularo) kiu produktis Sadler, Tonkin, Wells. Lin subtenas la olda gvardio, kiu strebas gardi la Centran Oficejon (en Roterdamo) kiu burokrate centralismo, kaj forte kritikas la elirantan prezidenton Fettes.

La brazila Maia estas ankorau en TEJO-ago: nuna estrarano de UEA, lin subtenas la samgeneracioj, momente kuplitaj al la teamo kiu ebligis la juran sen-dependiĝon de TEJO.

La elekti situas inter du kontinuecoj: la bankrotanta asocio de la pasinta jarcento aŭ la fiaskinta Fettes-strategio de la nuna jarcento. Neniu el la du kandidatoj proponas konkretan projekton por savi la ruinantan barakon.

Se estus elektita la usona brito, probable TEJO distancigus de UEA. Se gajnus la brazilano, malgajnus la bullerismo, sed povus distancigi al kies interesoj esprimas *Liberia Folio*. Ĉiukaze la asocio riskas esti pli fendita kaj pli malforta, kaj daure kun enorma financa deficit.

HeKo


Post la absurda Beckett, jen humuraĵo

Sub la gvido de dino Perla Martinelli, la dua eksperimenta staĝo pri beletra tradukado okupiĝis pri teatro: *Finalo de partio*, ĉefverko de Samuel Beckett. La unuan duonon de la dramo, tradukitan dum la kurso mem, kompletigis iom post iom la gekursanoj, daure konsilataj de la gvidantino. Rezultis kompleta traduko al Eo, kies specimeno legeblas baldaŭ en *Literatura Foiro*. Ĉu ĝi aperos kiel aparta libro, eventuale kun *Atendante Godot*, esperantigita de Tomasz Chmielik?

Por la ĉi-jara kurso estis elektita teksto kiu delonge devus ekzisti en Eo, sed kiun nia kulturo ĝis nun ignoris, kvankam ĝi plej taŭgas por la mondpercepto de la Esperantianoj, se ne de ĉiu E-istoj. Aliflanke ĝi estas legebla jam en la ĉefaj okcidenteŭropaj lingvoj: temas pri *La Papalago(j)* -- la kurso mem decidas pri la eventuala pluralo -- apokrife atribuita al indiĝeno el Samoo (certe ne la tie loĝanta sviso Marco Kapenberger), kaj eldonita en 1920 fare de germana aŭtoro, Erich Sheurmann (1878-1957).

La papalago estas la blankulo, kiun samoia indiĝeno, veninte al Eŭropo, observas de proksime en lia propra medio. La teksto, unuavide tre simpla, sed filozofie profunda, satiras pri la malvirtoj kaj malforoj de la blankuloj, en elano samtempe ekologia kaj moralisma.

Diversaj versioj alilingvaj aperis akompane al bildo desegnitaj de Joost Swarte, kiuj memorigas la verkon *Gruk* de Piet Hein, esperantigita de Poul Thorsen.




KURSO PRI BELETRA TRADUKADO, 8-14 JULIO 2019
kadre de projekto Nurenbergo, por la preparo de profesiaj tradukistoj.
Akceptitaj: Lorena Bellotti, Marie-France Conde Rey, Tiberio Madonna, Klaus Perko, Giuseppe Pranzo Zaccaria.

Porinfana literaturo inspire al la ateliero

Kial la porinfana literaturo inspresa al la ateliero pri prozo a kreivo, gvidota fare de Giorgio Silfer en Ĉaudefono, 15-21 jul 19?

Unue, ĉar kio placiĝas al infanoj, tio ĝenerale placiĝas ankaŭ al adultoj. Due, ĉar ofte necesas legi rakontojn al la plej etaj, kaj la paroloj gravas en literatura produktado, kiel atestas la indiĝenaj lingvoj, de Afriko ĝis Ameriko. Fine, ĉar la du elementoj kombiniĝas kun la bezono kreki ion originalan kaj samtempe transnacian, konforman al la esperanta kulturo.

La tri elementoj vi trovas en mia produktado por infanoj, nome la kantoj kaj la kamišibajoj, klarigas prof. Silfer. *Mi revizitis klasikajn, ekz. la fablon pri Cikado kaj*



Formiko, donante alian horizon-ton: ili ambaŭ amikas, ankaŭ Cikado (muzikisto) ja estas laboristo, kaj per sia kantado helpas Formikon trapasi la vintron sen granda enuo.

Simile okazis por fabeloj de fratoj Grimm, kiel Neuglino aŭ Ruĝa Ĉapuleto. La sep nanoj estas nur materiiĝo de la sep timoj ĉe Albaniva, kaj Lupo por Karmezina signifas la danĝeron de perfarto al infano.

En la ateliero ĉi elektos fabelon aŭ fablon, universale konatan, kaj transformos ĝin al io taŭga por la esperanta kulturo, tiel ke eblu transdoni ĝian mesaĝon al infanoj kaj al lingve progresantoj laŭ pli aktuala fono.

ATELIERO PRI ORIGINALA PROZA KREIVO, 15-21 JULIO 2019
Akceptitaj: Raya Androvska, Anna Bartek, Marie-France Conde Rey, Perla Martinelli, Adam Wilkius.
Ankorau po du lokoj estas disponebaj en ambaŭ aranĝoj.

Donacis ĝis marto

Sonja Brun 160,-. Anna Burgy 30,- David Buhlmann 90,-. Claude Blanc 60,-. Anna Bürgy 30,-. **Marie-France Conde Rey** 180,- John-Arthur Cork 25,-. **Esperanta Naturamikaro** 360,-. **Esperanta PEN-Centro** 360,-. **Feminisma Esperanta Movado** 360,-. Pierre-Henri Glazmann 40,-. Yvette Humbert Fink 50,-. **Kooperativo de Literatura Foiro** 360,-. Jean-Jacques Lavanchy 100,-. Walter Magistrini 20,-. **Perla Martinelli** 180,-. **Bertil Nilsson** 180,-. Eliane Purro Lavanchy 100,-. **Giorgio Silfer** 180,-. Walter Želazny 180,-. svisaj frankoj. (Apogantoj)

KORAN DANKON!



Aprila domflegado

La domo estas por KCE rimedo kaj ne celo: sen la konstanta lugo de du apartamentoj, la kulturcentro ne povus plu vivi. Sed por garantii tiun enspezadon ne necesas ke la stabo dediki al la domflegado siajn tempon kaj energion.

Tiu zorgon plenumas fondumo Pro Esperanto, kies kunlaborantoj ĉi-monate renovigas la palisaron de la teraseto, paragon kaj lavabon en la Privata, plenumas plurajn etajn riparojn, ordigas lokalojn. La E-Domo atendas siajn gastojn pli kaj pli komforte.



Kial *Literatura Foiro* kaj ne *Literatura Folio* aŭ *Forumo*? Kial la fondinta rondo nomiĝis "La Patrolo", kvankam ne temis pri skolto grupo? Jen la unuaj el dekoj da demandoj kiujn respondos dino Perla Martinelli dum sia promenado tra duona jarcento. Ne nur trafojumi la revuon, sed ankaŭ kompreni ĝian rolon en nia kulturo, eĉ prognozi ĝian profilon post la ora jubileo. Same kiel en la tornistro de ĉiu soldato situas la bastono de marŝalo, eble el ĉi tiu kurso fontos redaktoro de LF...

LF-koop anoncas pozitivan bilancon pri 2018. Rimarkindaj estas la vigeenco de la librofako, per la du titoloj *Historio de la esperanta literaturo kaj Paſojo al plena posedo*; la relevigo de la diskofako, kun tri projektoj realigataj; kaj la fortigo de *Literatura Foiro*, kiel produkto kiel kiel abonanton.

Paralele bonfartas la rento pro la posedataj apartamentoj, kvankam ili restas proprieto de la mecenatoj, ĝis la morto de ĉi-lastaj. La Asembleo de LF-koop, sub la prezido de cino Marie-France Conde Rey, pritraktis 14 apr 19 la perspektivon de la socio ankaŭ konsidere pri la neceso largigi la kooperativon al novaj elementoj, kiuj estu indaj je la heredo de la marko kaj de la kapitalo, post la retiro de la nuna generacio.

KIEL SUBTENI NIN?
Vi povas donaci monon laŭ la enlanda valuto tra la subaj kontoj / IBAN:

CH63 09000000230029218
KCE, Svislando

FR49 10011000200863031503 W66
BIC: PSSTFRPPCNE
Francio

IT24 G076010160000072627193
Martinelli Perla
Milano, Italiu

ES69 21030146980030051518
Esperanta Naturamikaro
Málaga, Hispanio

BE60 000315654770
Ari Valerio
Bruselo, Belgio

SE21 95000099603403747482
Literatura Foiro
Svedio

HU29 10918001000006513390009
Anna Bartek
Budapest, Hungario
por UEA-klientoj:
konto Ifoi-i